

Enkonduko al Epizodo 5

INSTRUISTO:

Saluton! Kiel vi fartas? Ĉu vi rekonas min? Certe, mi estas Elsa, kun nova hararanĝo. Espereble ĝi plaĉas al vi. Nu, en la kvara leciono ... ĉu vi memoras? ... vi lernis kiel uzi la finaĵon -n kun du-ligaj verboj. Unu-liga verbo havas nur unu partoprenanton; dum du-liga verbo havas du partoprenantojn, el kiuj unu ricevas la finaĵon -n. Ekzemple, "havi". Fakte necesas havi ion: libron aŭ ŝafon. Simile, "rigardi" - mi devas rigardi ion, ekzemple libron aŭ ŝafon.

Mi esperas, ke vi bone komprenas kiel uzi la gravan finaĵon -n. Bone atentu, ĉar en la nuna kaj en sekvaj lecionoj, vi multfoje reaŭdos kaj mem uzos ĝin.

Tamen intertempe ... kio pri Georgo, kiu ne plu memoras, kiu aŭ kie li estas? Kio pri Ruselo? Do rigardu, aŭskultu, kaj ĝuu!

SCENO 1 (PARKO)

RUSELO Do, kara ŝafo, ni iru al la urbo ... Ĉar mi terure malsatas ... terure soifas. Sed ... kiu kuras? Ho, ve! Dekoble, centoble, miloble ... ve! Karlo! Kaj ... li abomenas nin! Rapide ... ni kaŝu nin ... jen kaŝejo ... malantaŭ la arbusto ... venu! Jen bona kaŝejo ... jen ni ... kaŝitaj! Sed ... silentu, mi petas! Silentu! Ne bleku!

KARLO Be! Kioma horo estas? Ho ... jam la sepa dudek kvin! Do ... kie estas la arbusto? Be! Stultulo mi estas! Ne tiu ĉi arbusto ... tiu! Nu ... mi vidu! Mi serĉu! Be! Kie ĝi estas ... kie ĝi estas kaŝita? Hura! Jen mia pakaĵo! Jen ĝi! Perfekte! Finfine ... mi havas mian pakaĵon! Finfine! Unu, du, tri, kvar, kvin ...

RUSELO Strange ... ! Kion li faras? Jen mistero, ŝafo!

SCENO 2 (HEJMO)

HELENA Jen! Mi montros al vi fotografiaĵon, paĉjo ... belan fotografiaĵon! Rigardu! Rigardu la foton! Mi fotis vin ĉe Esperanto-kongreso ... ĉu vi memoras? Do ... rigardu, paĉjo! Rigardu la fotografiaĵon! Jen vi ... Jen vi ... vi kisas panĵon ... vi kisas ...

GEORGO Ne! Tiu virino kisas min! Mi ne konas ŝin ... kiu ŝi estas? Kaj kial ŝi kisas min? Ho! Mi scias! Ŝi estas virinaĉo ... aĉulino!

FILISA Ho, Georgo ...

GEORGO For! Mi rekonas vin! Vi estas la virinaĉo ... la virinaĉo en la foto!

FILISA Georgo ... mi estas via edzino!

GEORGO Vi estas danĝerulino! Vi kisas virojn ... senpermese ... vi estas aĉulino ...

HELENA Paĉjo! Trankviliĝu ... !

GEORGO Sed mi telefonos al la polico! Vi senpermese tenas min ... en tiu ĉi domo ... en tiu ĉi prizono ... vi kisas sinjorojn ...

HELENA Ho, ve! Kion li nun babilas?

GEORGO Kisaĉo! Abomenaĵo! Aj! Ve! La kapo! Fulmotondras en la kapo ... Doloras min la kruroj ... brakoj ... ve! Ho, ve! Mi mortas!

SCENO 3 (STRATO)

RUSELO Ho, ve, kara ŝafo . . . dekoble, centoble, miloble, ve! Mi ankoraŭ malsatas . . . ankoraŭ soifas. Ho, ve . . . mia malplena stomako graŭlas kaj grumbblas kiel . . . Jes . . . ĝi graŭlas kaj grumbblas kiel vulkano . . . Ve, stomako! Ne tiel graŭlu kaj grumblu . . . ne kiel vulkano! Ho . . . kial ni venis al tiu ĉi malamika lando? Kial ni venis . . . ? Sed . . . jes! Kial ne . . . ? Venu, ŝaf-amiko mia . . . venu! Mi scias, kiu helpos!

SCENO 4 (BUTIKO)

FLORA . . . jes, kompreneble ekzistas problemoj. La varoj en mia vendejo . . . la kolĉenoj el Afriko, la bildoj el Eŭropo, kaj tiel plu . . . venas nur de esperantistoj. Tiel . . .

KEN Kio . . . ? Mia intervjuo! Denove interrompita!

RUSELO Ho! Finfine! Ho! Mi petas vin . . . helpu!

FLORA Aj . . . ! La strangulo! La danĝerulo! Kun la ŝafo! Jen . . . ! Kaj denove . . . jen!

RUSELO Ve! Ne batu min! Ne batu min! Dekoble, centoble, miloble . . . ve!

FLORA Jen! Mi abomenas ŝtelistojn . . .

RUSELO Ve! Aŭskultu min . . .

FLORA Mi abomenas danĝerulojn . . .

KEN Sinjorino . . . ! Kion vi faraĉas . . . ? Haltu! Haltu . . . mi petas vin! La kompatinda sinjoro!

RUSELO Haltu . . . mi petas vin!

KEN Ho, ve, sinjorino! Kio . . . ? Kial . . . ?

FLORA Ho, ve! Mi svenas!

KEN Ho, denove! Mi tenos vin! Sinjoro . . . mi pardonpetas. Tamen komprenu . . . hodiaŭ venis detektivo . . .

RUSELO Ho, ve! Dekoble, centoble . . .

FLORA Jes . . . venis detektivo, ĉar vi estas ulo danĝera . . . stranga . . . vi ŝtelis monon!

RUSELO Ne, ne, sinjorino! Tute ne! Ho, ve . . . aŭskultu! Aŭskultu!

SCENO 5 (HEJMO)

JOLANDA Nu . . . certe! Simple . . . li drinkaĉis, terure ebriiĝis . . . li falis . . . kaj, kiam li falis . . . pum!

FILISA Kompatindulo!

HELENA Terure doloras lin la kapo . . . fulmotondre.

JOLANDA Kaj nun . . . li ne scias, kiu li estas, kie li estas, aŭ kio li estas.

KARLO . . . kvardek sep, kvardek ok, kvardek naŭ! Jen . . . mi kuris . . . mi fulme kuris . . .

FILISA Finfine! Vi revenas, nia atleta!

JOLANDA Kion vi tenas en la mano . . . tiun pakaĵon?

KARLO Pakajon . . . ? Kiun pakajon . . . ?

JOLANDA Karlo . . . !

FILISA Ve! Mia edzo ne scias, kiu li estas . . . mia filo ne scias, kion li portas. Kie mi estas . . . en idiotejo?

JOLANDA Karlo! Vi portas pakajon . . .

KARLO Be . . . ĉu? Pakajon . . . ? Ho! Jes! Ĉu tiun ĉi pakajon? Nu . . . mi trovis ĝin . . . en la . . . ho! Kioma horo estas? Kio? Jam la deknua tridek kvin! Pardonon . . . ĝis!

JOLANDA Sed . . . ho, egale! Tiu Karlo . . . li estas mistero . . . granda mistero.

FILISA Ankaŭ Georgo estas mistero . . . ĉu ne?

SCENO 6 (BUTIKO)

RUSELO Do, vidu . . . jen la tuta afero! Georgo prenis la monon el la tekruĉo . . . Li prenis la mil kvincent sepdek stelojn el la tekruĉo . . . Li portis la monon al vi . . . Kaj li donis la monon . . . la monon de la familio Bonvolo . . . li donis ĝin al vi . . . tie ĉi . . . en la vendejo. Certe . . . certe vi memoras . . . ĉu ne? Do, vidu . . . mi ne ŝtelis la monon . . . la mono simple ne estas ŝtelita!

DETEKTIVO Jen la ŝtelisto . . . la senpasporta strangulo . . . la kunŝafa danĝerulo!

RUSELO Ve! Dekoble, centoble . . .

DETEKTIVO Finfine! Mi trovis lin! Mi trovis lin . . . oj!

DETEKTIVO Oj! Haltu! Haltu! Aĉulo . . . ! Ŝafistaĉo . . . ! Haltu!

FLORA Venu . . . ! Rapidu . . . !

KEN Kio . . . !

FLORA Ne demandu! Simple . . . venu!

SCENO 7 (ĜARDENO)

GEORGO La ĝardeno estas bela, ĉu ne, sinjoro?

KARLO Silentu, mi petas. Mi legas.

GEORGO La prizono havas belan ĝardenon . . . ĉu ne, sinjoro?

KARLO Paĉjo! Tiu ĉi ne estas prizona ĝardeno. Tiu ĉi estas via ĝardeno. Sed . . . mi petas vin. ne interrompu min! Mi legas.

GEORGO Plaĉas al mi la skulptaĵo. Ĝi estas bela. Imagu . . . skulptaĵo en prizona ĝardeno! Kiu . . . kio estas la nomo de la skulptaĵo?

KARLO Ho, ve!

GEORGO Ĉu vere . . . ? Jen interesa nomo por skulptaĵo. Sed . . . la floroj . . . malplaĉas al mi floroj . . . florojn mi abomenas . . .

KARLO Denove . . . mi petas vin! Silentu! Ne interrompu min!

GEORGO Kion vi legas . . . ?

KARLO Be! Mi legas libron . . . Esperanto-libron . . . jen, rigardu! Lingvaj Respondoj . . . de Zamenhof.

GEORGO A! He! Kiu . . . ? Zamenhof . . . Ludoviko Lazaro Zamenhof . . . Jes! Zamenhof . . . mi memoras . . . mi memoras . . .

FILISA Georgo . . . Georgo! Mi scias . . . pri la mono . . . ĉio estas en ordo!

KARLO Kio . . . ? La ŝtelita mono?

FILISA Georgo . . . aŭskultu! S-ino Bundo . . . Flora . . . Ŝi diris . . .

GEORGO Ĉu floroj . . . ? Ĉu Flora Bundo . . . ? Tie ĉi . . . ? En prizono . . . ? Ve! Fulmotondre! Ve . . . !

SCENO 8 (HEJMO)

FLORA Do jen . . . Ruselo ne ŝtelis vian monon. Li ne estas ŝtelisto.

FILISA Kompreneble! Mi tion diris... sed neniu kredis min! Ho, Jolanda! Paĉjo . . . Georgo: kiel li fartas?

JOLANDA Li dormas. Li dormas trankvile . . . kiel libro en biblioteko.

KARLO Libro ne dormas . . . nu, bone.

FILISA Bone! Li dormu! Mankas al li dormo . . . mankas al li trankvilo.

FLORA Jes . . . kaj mankas al li memoro.

SCENO 9 (PARKO)

RUSELO Ni estas solaj, kara ŝafo. Senkompate solaj... nur vi kaj mi. . . en sovaĝa, stranga, granda mondo. Neniu . . . neniu helpas nin. Sed . . . momenton! Karlo akuzas nin . . . jes! Detektivo serĉas nin . . . jes! Flora Bundo . . . ho, kiu scias? Sed . . . Helena!

Helena helpas nin! Dekoble, centoble, miloble . . . jes! Helena! Ŝi savos nin! Kio . . . ? Jes! . . . Helena laboras hodiaŭ en la domo . . . ŝi skulptas. Sed eble Karlo estos en la domo . . . kaj eble la detektivo . . . ho! Vidu, kara ŝafo! Mantelo! Granda, bruna mantelo . . . ĝi estas detektivo-mantelo! Barbo, notlibro, okulvitroj! Perfekte! Mi surmetos la okulvitrojn . . . jen! . . . kaj neniu scios, kiu mi estas! La ŝtelisto! Finfine mi havas lin! Mi trovis lin!

SCENO 10 (HEJMO)

FILISA Mi ne scias. Mi terure maltrankviliĝas. Georgo dormas . . .

HELENA Bone, panjo. Tio helpas lin.

FILISA Sed li ankoraŭ babilas . . . pri rompita vazo . . . pri floroj . . .

HELENA Eble li estas ankoraŭ ebria.

JOLANDA Ne, ne. Li ne estas ebria . . . eĉ ne postebria. Li estas malsana.

FILISA Malsana! Ĉu . . . ĉu vi kredas tion?

JOLANDA Kara panjo . . . mi estas certa . . . certa kiel la fakturoj de Flora Bundo. Paĉjo estas malsana . . . kaj mi vokos kuraciston!

FILISA/HELENA Kuraciston . . . !

JOLANDA Jes...kuraciston!

SCENO 11 (PARKO)

DETEKTIVO Kio . . . ? Mia mantelo! Ŝtelita!

SCENO 12 (HEJMO)

KEN Ho, finfine, sinjorino! Mi trovis vin!

HELENA Pardonu, sinjoro raportisto . . .

KEN Ken! Nomu min Ken, mi petas vin!

HELENA Jes, bone . . . Ken. Sed pardonu... mi laboras . . . mi skulptas. Kaj do mi iros. Ĝis.

KEN Sinjorino. Mi serĉis vin ĉie. En la parko, en la urbo . . . ĉe la informejo. Imagu, kiam vi forkuris . . . rapidis el via butiko . . .

FLORA Mi pardonpetas, sinjoro. Sed . . . la cirkonstancoj.

KEN Jes, jes . . . la cirkonstancoj. Sed memoru . . . nia intervjuo estis interrompita. Ni faru denove . . .

FLORA Ne, ne . . . mi petas vin . . .

KEN Ni faru denove . . . ekde la komenco. Jen seĝo . . . sidiĝu, mi petas.

FLORA Ne . . .

KEN Sidiĝu . . . jen! Nu . . . sinjorino Bundo . . . diru al mi pri via butiko...

SCENO 13 (ĜARDENO)

GEORGO Rompita vazo . . .

JOLANDA Vi! Vi kulpas! Kial vi akuzis la ŝafiston?

KARLO Be! La ŝafisto havis la monon.

JOLANDA La ŝafisto havis monon . . . sed ne nian monon.

GEORGO Mi pagos . . . jes, mi pagos.

KARLO Mi ne sciis . . .

JOLANDA Kompreneble vi ne sciis. Vi akuzis iun . . . sen pruvoj. Mankis al vi pruvoj . . .

KARLO La detektivo kredis min.

JOLANDA Li estas idioto... mi konas lin. Sed vi . . . vi akuzis la ŝafiston, ĉar vi abomenas la ŝafon.

KARLO Ne, ne . . .

JOLANDA Ne mensogu, Karlo! Vi abomenas la ŝafon . . . sed mi abomenas tiujn, kiuj ne diras la veron.

GEORGO Verdire . . . jes, mi pagos! Mi ne forgesos!

JOLANDA Mi abomenas tiujn, kiuj mensogas. Kaj . . . ni parolas pri vero . . . diru: Kio pri la pakaĵo?

SCENO 14 (HEJMO)

FLORA . . . Jes, jes, komprenu . . . cirkonstancoj katastrofaj! Al mi mankas klientoj . . . al la klientoj mankas mono . . . kaj jen! Jen la tuta afero! Sed . . . mi vidas la vojon antaŭ mi. Mi scias, kion mi faros! Mi . . . Ve! Denove . . . la sonorilo!

KEN Ve! Denove . . . la intervjuo! Interrompita!

FLORA Mi suferas . . . doloras al mi la kapo . . . la oreloj! Tin-tin . . . tin-tin! Ve! La oreloj!

KEN Sinjorino! Ĉu vi malsanas? Mi vokos kuraciston!

FLORA Jes . . . ne. Mi ne scias. Ho, ve! Mi svenas! Mi falas . . . !

HELENA Ĉu vi estas surdaj? Ĉu vi denove ne aŭdas la sonorilon? Tin-tin . . . jes! Iu sonoras . . . ĉe la pordo. Iu atendas nin.

KEN Permesu . . . vi malsanas. Tin-tin en la oreloj . . . Mi vokos kuraciston.

HELENA Kuracisto! Jen kuracisto . . .

RUSELO Kie?... Momenton!

KEN Vi venis tre rapide! Mi ankoraŭ ne telefonis!

RUSELO Atendu...!

HELENA Paĉjo malsanas ... venu!

KEN La sinjorino malsanas ... rigardu!

RUSELO Dekoble, centoble, miloble, ve! Helpu min, ŝafo ... helpu min!

SCENO 15 (ĜARDENO)

GEORGO Kvincent steloj . . . mil steloj . . .

FILISA Jen, doktoro . . . jen mia kara Georgo . . . kompatinda Georgo!

RUSELO Sinjorino . . .

FILISA Li falis, doktoro . . . kaj la kapo . . . pum! Nun li babilas . . . babilas pri . . . pri ĉio.

RUSELO Sinjorino . . . vere . . . ho, ve! Aŭskultu! Mi ne estas doktoro. Mi estas . . .

FILISA Mi pardonpetas! Ho, pardonu min! Vi estas specialisto . . . fama, granda specialisto el la malsanulejo!

GEORGO Mil ducent steloj . . . mil tricent . . .

RUSELO Ne, ne . . . ne el la malsanulejo. El . . .

FILISA Egale! Tamen . . . vi kuracos lin!

GEORGO Mil kvarcent . . .

RUSELO Je Zamenhof!

- GEORGO A! He! Kiu . . . ? Zamenhof . . . Ludoviko Lazaro Zamenhof . . .
En la mondon venas nova sento . . . Jes! Zamenhof . . . jes . . . mi memoras .
mi memoras . . . kompreneble . . . Zamenhof!
- FILISA Georgo . . . !
- GEORGO A! He! Kie . . . kiu . . . Filisa!
- FILISA Ho! Li rekonas min! Finfine! Georgo rekonas min!
- GEORGO Jen Jolanda . . . Karlo . . . Helena . . . en la ĝardeno!
- FILISA Ho, filozofoj! Vi terure malsanis! Sed . . . dank' al tiu ĉi sinjoro . . . tiu ĉi doktoro . . .
specialisto...
- RUSELO Sinjorino . . . mi ne estas doktoro. Sed . . . doktoro kuracis vin. Doktoro Zamenhof!
- FILISA Ni dankas vin . . . elkore dankas vin. Sed, ve! Mankas al ni mono!
- RUSELO Mi scias. Ho! Tio estas . . .
- FILISA Aj . . . ! Ĉu vi aŭdis . . . ?
- RUSELO Mia stomako! Ĝi blekas . . . ĝi graŭlas kaj grumblas kiel vulkano.
- FILISA Do . . . pri via fakturo, sinjoro.
- RUSELO Egale! Do . . . mi skribos noton . . . pri la medikamentoj por via edzo. Kaj mi donos ĝin al la
fraŭlino . . . la skulptistino . . . ve! Kie ŝi estas? Kie ŝi kaŝas sin?
- GEORGO Mia filino Helena laboras. Ŝi multe laboras.
- FILISA Skribu vian noton, specialisto, kaj donu ĝin al mi. Kaj vi, Georgo . . . venu! Mi verŝos al vi
grandan glason da minerala akvo. Ĉar minerala akvo tre plaĉas al vi . . .
- FILISA/JOLANDA/KARLO Kaj minerala akvo estas bona trinkaĵo por filozofo!
- RUSELO Ve! Jen miaj . . . miaj 500 steloj! Mi ne estas ŝtelisto . . . sed la stulta detektivo! Nu.... la noto -
jes!
- SCENO 16 (HEJMO)
- FLORA Denove! Tin-tin . . . tin-tin . . . en la oreloj . . . en la kapo . . .
- HELENA Nekredeble! Ĉu vi vere estas surdaj? Kial vi ne aŭdas la sonorilon? Tin-tin . . . jes!
Iu sonoras . . . ĉe la pordo. Iu atendas nin.
- KEN Trankviliĝu, kara sinjorino . . .trankviliĝu, mi petas vin.
- HELENA Panjo . . . stranga afero . . .
- DOKTORO Bonan tagon! Mi estas kuracisto . . . doktoro!
- FLORA Ve! Li svenas! Li falas! Li mortas!

CONCLUSION TO EPISODE FIVE

TEACHER So...why did Karlo swoon and fall? And what will happen to the message attached to the statue? To find out, wait for the sixth lesson!

Let's turn to a new thing: the correlatives, or table-words. Look: the prefix "ki-" signifies a question or a comparison, so the word "kiu" asks about or compares with an individual (which one, who); "kio" about a thing or idea (what); "kie" about a place (where); "kiam" about a time (when); "kiel" about a manner (how); "kiom" about a quantity (how much); "kial" about a cause (why), and so on.

Ki means a question or a comparison

KI+U {individual}	=KIU asks about an individual "who?"
KI+O (thing or-idea)	=KIO asks about a thing or idea "what?"
KI+E (location)	=KIE asks about a location "where?"
KI+ AM (time)	=KIAM asks about time - "when?"
KI+EL (manner)	=KIEL asks about manner - "how?"
KI+OM (quantity)	=KIOM asks about quantity "how much?"
KI+AL (cause)	=KIAL asks about cause - "why?"

So I can ask "Who is the shepherd?" and you will reply "Ruselo is the shepherd." Or I can ask about Karlo "What is he doing?" And you reply "Karlo is running". In addition, Georgo, looking at the photograph, says "And why is she kissing me?" and you can reply that Filisa kisses him because he is her husband.

In fact, you have already used the word "kiel". Do you remember that when you see a friend, you greet him saying: "How are you doing?" Or when you want to find out someone's name, you ask "What's your name?"(How are you called?)

Fine! You knew how to ask using the prefix "ki-". But you can use it also in another way. Did you notice what Ruselo said, when he was terribly hungry? He said, "My empty stomach is growling and grumbling like a volcano." Like a volcano - in that way Ruselo compares his empty stomach with a volcano which growls and grumbles.

Also "tiu" is known to you. Imagine that several Esperantists are speaking. We want to know who in the group is the philosopher and ask: "Who is the philosopher?" and pointing out to us Georgo Bonvolo, possibly someone answers, "That one is the philosopher." The prefix "ti-" relates to pointing...we can point out an object or idea using "tio" (that thing), an individual using "tiu" (that individual), a location using "tie" (there), a time using "tiam" (then), a manner using "tiel" (thus), a quantity using "tiom" (that much) , a cause using "tial" (in that way)..

TI signifies a reply or a pointing out

TI + U (individual)	= TIU relates to an individual
TI + O (thing or idea)	= TIO relates to a thing or idea
TI + E (place)	= TIE relates to a place
TI + AM (time)	= TIAM relates to a time
TI + EL (manner)	= TIEL relates to a manner or comparison
TI + OM (quantity)	= TIOM relates to quantity
TI + AL(cause)	= TIAL relates to a cause.

Hopefully you noticed the relationship between the correlatives. They are in fact logically and beautifully constructed! But don't worry if you don't understand the whole thing the first time. Remember that you can review the lesson many times, and little by little you will understand more and more! And...did you catch the n-ending heard in the lesson? We recommend that you watch the lesson again and repeat the words with the actors. Now do the exercises, and then go to the sixth lesson. You will see whether a catastrophe will result from the note attached to the sculpture! Goodbye!